# *La defend-komitatoj estas nedisigeblaj atestantoj de la Revolucio*




**Festparolado de la prezidento Miguel Díaz-Canel ferme de la kongreso de CDR**

Havano, sep 29 (RHK) La Komitatoj por la Defendo de la Revolucio (CDR) estas nedisigeblaj atestantoj de la nacikonstrua procezo, diris  en ?i tiu ?efurbo, Miguel Díaz-Canel Bermúdez, Unua Sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo kaj Prezidanto de la Respubliko, dum la fermo de la 10-a Kongreso de la plej granda amasorganizo en la lando.

La kuba ?tatestro  elstarigis ?i-?a?don la sukceson de la Pintkunveno de la Grupo 77 kaj ?inio, okazinta en Havano la 15-an kaj 16-an, kaj la klasifikita kiel evento de tutmonda intereso.

La ?tatestro emfazis, ke granda parto de la sukceso de la Pinta Konferenco ?uldi?is al la kontribuo de kubanoj, malgra? tio, ke la fiparolantoj kontra? la insulo provis malgravigi ?in.

Li denuncis, ke malamikoj de la Kuba Revolucio provis subfosi la temojn diskutitajn en la Pintkunveno, "kvaza? la Sudo estus indiferenta a? nenecesa por debati pri scienco, teknologio kaj novigado."

En alia momento li estarigis ke ?i tiu kongreso, kiu fermi?as hodia? ne povas eskapi la situacion de la lando, kiu estas ekonomie kompleksa, kaj povus fari?i pli malfacila, se ni ne ?iuj agas kun sento de lando, kiu kondukos nin agi kiel la unuo, kiu ni estas, por eltiri la plej bonan kaj plej sindoneman el ni mem. Se la kvartalo agas, la krimulo retiri?as, la koruptulo hontas, la familio pliforti?as, la senprotektuloj trovas protekton, kaj la junuloj, spacojn por siaj projektoj; Resume, la eblecoj estas senfinaj en niaj komunumoj.

Estas tempo por populara kontrolo; defendi la Revolucion kaj defendi la rajton, aprobitan en la Konstitucio, konstrui kaj disvolvi la socialismon, kiun ni elektas kiel la solan sistemon, kiu garantias la plej altan gradon de socia justeco ebla.

Fonto: Granma/PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/335400-la-defend-komitatoj-estas-nedisigeblaj-atestantoj-de-la-revolucio

Radio Habana Cuba